



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalho, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 242-5211

70.000 - Brasília (DF)

CGC Nº


00406 504/1000-06

OCTUBRO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 49

Redação: MARIA ALMADA




Enirejo de la sidejo. De maldekstre: S-ro Ubaldo A. Cavalcante, vendinto; Carlos A. S. Cunha, financa direktoro kaj Nelson Pereira de Souza - ĝenerala sekretario de BKE.

BKE AKIRIS PROPRAN SIDEJON EN BRAZILJA (FD)

Brazila Konsilantaro de Esperanto, la 24-an de oktobro, 1979, aĉetis sidejon, kiu estas en la konstruaĵo "Ed. Jockey Club", sala 103, "Setor Comercial Sul" kun telefonaparato n^o 226-1298, en Brazilja (FD).

Por aĉeti la sidejon ne estis sufiĉa la jam kolektita monsumo kaj la direktoraro



Subskribo de la provizora kompromiso.

de BKE ankoraŭ ŝuldas Cr\$ 136.200,00 plus la koncernajn elspezojn farotajn, kio okazos dum la venontaj 3 monatoj, kaj kiujn ni devas pagi.

Ni apelacias al niaj malavaraj gesamideanoj kaj karegaj kunlaborantoj, helpu nin finpagi la menciitan ŝuldon, kiun la direktoraro de BKE persone garantias. La aĉeto estis urĝa pro la konstanta inflacio.

La ejo apartenas al la esperantistaro,

landa kaj internacia. Ĝi estas kultura centro en nia belega ĉefurbo, kaj estos utiligata de la LKK-1981 kiu prizorgas la 66-an Universalan Kongreson okazontan en Brazilo, kiu jam eklaboris.

Brazila Konsilantaro de Esperanto estis fondita antaŭ 5 jaroj, kiam nia movado agoniis kaj dank'al niaj helpantoj ĝi nun floras. Neniam okazis, ke iu organizaĵo

esperanta post sia kvinjara ekzisto aĉetis propran sidejon, sed BKE tion faris. Kompreneble sen la fido kaj helpo de vi ĉiuj ni neniam sukcesus.

Ni antaŭdankas la malavaran monhelpon kaj petas sendi ĝin al nia financa direktoro Carlos A. Siqueira da Cunha Caixa Postal N^o 13.2088 - Brasília (DF) kaj Dio vin rekomencu!

SITUACIO DE LA KAMPANJO POR AĈETI SIDEJON

01 - Allan Kardec Afonso Costa	Cr\$	7.000,00
02 - Alvaro Rabelo	Cr\$	7.000,00
03 - Antonio Bezerra de Oliveira	Cr\$	3.000,00
04 - Antonio Rodrigues da Silva	Cr\$	10.000,00
05 - Banco Nacional S.A.	Cr\$	5.000,00
06 - Claudio Zimmermann	Cr\$	3.500,00
07 - Carlos A. Siqueira da Cunha	Cr\$	10.000,00
08 - Carlos Henrique Dionísio	Cr\$	10.000,00
09 - Delio Pereira de Souza	Cr\$	2.000,00
10 - Edson da Costa Ribeiro da Fonseca	Cr\$	2.000,00
11 - Elias Couto de Almeida	Cr\$	5.000,00
12 - Elvira Fontes	Cr\$	4.000,00
13 - Enivaldo Alves Silva	Cr\$	1.000,00
14 - Eugênio Doin Vieira	Cr\$	500,00
15 - Eugênio José Gramignea	Cr\$	7.000,00
16 - Francisca Martos	Cr\$	3.500,00
17 - Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho	Cr\$	2.000,00
18 - Francisco S. Almada	Cr\$	10.000,00
19 - Gilberto A. Silva Velho	Cr\$	1.000,00
20 - Gomercindo Dias Nunes	Cr\$	10.000,00
21 - Hélio Fontoura Aderne	Cr\$	2.000,00
22 - José Cecílio de Carvalho	Cr\$	7.000,00
23 - Luiz Teixeira da Silva	Cr\$	1.000,00
24 - Marcello Vieira de Andrade	Cr\$	5.000,00
25 - Maria P. Almada	Cr\$	10.000,00
26 - Mauro Libânio da Fonseca	Cr\$	1.500,00
27 - Modesto Belmonte de Abreu	Cr\$	10.000,00
28 - Nelson Pereira de Souza	Cr\$	3.500,00
29 - Nelson Ribeiro	Cr\$	5.000,00
30 - Nydia Aydos Krieger	Cr\$	10.000,00
31 - Oswaldo Arruda Stein	Cr\$	10.000,00
32 - Pedro Firmino Machado Marques	Cr\$	500,00
33 - Waldemar Antonio Mendes	Cr\$	10.000,00
34 - Wilson Pereira Deslandes	Cr\$	10.000,00
35 - Yvone Aydos Krieger	Cr\$	10.000,00
TOTAL até 20-10-79	Cr\$	199.000,00

LA UNUA KONGRESO DE BRASILA KONSILANTARO DE ESPERANTO EN JUIZ DE FORA (MG) - 3/6 - APRIL
Pere de la Bulteno N^o 48 ni jam dissen-

dis kelkajn aliĝilojn al niaj gesamideanoj kaj en ĉi-numero ni daŭre represigas ilin, petante, ke la aliĝontoj kune kun la aliĝilkotizoj volu sendi al la kasistino

kun ĉeko pagebla en Santos (SP).

En nia bulteno ni aperigos ĉies nomojn de la aliĝintoj. Ni petas ĉiujn niajn karegajn geamikojn, ke eluzu la nealtan kotizon aliĝante tuj, ju pli frue.

Ni estas konvinkitaj, ke nia anaro ĉifoje helpos nin disvastigi Esperanton, elmontrante al la Universitatoj en Juiz de Fora kaj Volta Redonda, kiom da personoj jam scipovas la internacian ligvon. La plej efika propagando estas la granda nombro da ĉeestantoj. Ni kalkulas je ĉeesto de multaj gesamideanoj. La aliĝnúmero de la kongresanoj estos uzota por lotumado de libroj kaj aliaj esperantaĵoj.

Ni klopodos aranĝi senpagan loĝejon kaj nemultkoston manĝaĵon, laŭ la eblo. Ni scigos pri hoteloj pli proksime al la dato de la kongreso.

Estas planite vizito al Universitato. - Juiz de Fora estas pitoreska urbo kaj oni povas ĝin atingi per bonegaj ŝosejoj, fervojo aŭ aviadile.

Ĝia klimato estas milda; ĝi estas 679 metrojn super la marnivelo.

Karaj gesamideanoj, via Pasko estos pli agrabla kaj feliĉa en Juiz de Fora kaj Volta Redonda. Ni atendos vin!

x - x - x - x - x - x

66 - A UK EN BRAZILJA

Certe la 66-a Universala Kongreso, kiun la unuan fojon organizas la esperantistaro en Sudameriko estos notinda kaj historia.

Ĝia Patrono estos la Prezidento de la Brazila Respubliko, Generalo João Batista Figueiredo, kaj ĝia prezidanto la senatano, D-ro José Lins Vasconcelos de Albuquerque. Ni kalkulas je ĉeesto de ĉirkaŭ 2.000 geesperantistoj. Multaj brazilanoj ankoraŭ ne konas la faman ĉefurbon de Brazilo.

S-ano Affonso Henriques Corrêa, brazilano, sed vivanta en Usono ek de la jaro 1932-a, sendis al ni kopion de sia letero direktitan al Prezidento de la Respubliko Figueiredo. S-ano Corrêa deklaris sian entuziasmon pro la okazonta UK en Brazilo. Li klarigis al la Prezidento Figueiredo, ke en Svislando la esperantistaro faris bonegan turismon kaj la lando pergajnis ĉirkaŭ U\$ 6.000,000 (ses milionojn da dolaroj).

Li elstarigis la valoran kunlaboron de

la UEA - direktorino Ursula Grattapaglia kaj de ŝia edzo Inĝeniero Giuseppe, kunlaborantoj kun la naciaj organizaĵoj. La letero de S-ano Corrêa certe helpos la movadon, ĉar vekigas la atenton de la Prezidento de la Respubliko, João Batista Figueiredo.

Same S-ano Corrêa substrekiis sian intencion partopreni la 66-an UK en Brazilo kune kun sia ĉarma edzino Katarina.

La geedzoj Almada dankas al li la afablajn vortojn rilate la pormovadan laboron.

x - x - x - x - x

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn periodaĵojn: "O NO.SSO, "Correio Fraterno do ABC", "Cidade de Rio Claro", Bulteno de Pernambúka Societo", "Integração", "Diário de Taubaté", "A Voz da Cidade", "S. Vicente Jornal", "Correio do Povo" kaj "A Nova Era".

x - x - x - x - x - x

INFANA TAGO

Dediĉe al la Semajno de la Infano, ni publikigas poeziaĵon de la plej fama hungara poeto Sándor Petofi, tradukitan de K. Kalocsay.

VANIĜINTA PLANO

Dum tuta vojo al la hejmo
mi planis en medit':
kiel saluti panjon en
momento de l'revid'.

Kion plej belan diri do
por la unua foj',
se l'brakojn, kiuj lulis min,
etendos ŝi kun ĝoj'?

Tra mia kapo kuris jam
da belaj pensoj mil,
dum stari ŝajnis tempo, sed
rapidis veturil',

Enpasis mi, alflugis kaj
brakojn etendis ŝi;
surpile, kiel arbe frukt',
senvorte pendis mi.

x - x - x - x - x - x

MONO RICEVITA

Por nia Informa Bulteno ni ricevis la jenajn sumojn, kiujn ni dankas:

Claudio Zimmermann Cr\$ 100,00
Leonio Marobin 150,00
M. Belmonte de Abreu 500,00

Sumo 750,00

x - x - x - x - x - x

LINGVA PRIKOMENTO

D. W. - Argentino

"Reveninte hejmen li trovis sian fratinon kuiranta en la kuirejo". - "Trov!" estas transitiva verbo tial la literon "n" ricevas ankaŭ la vorto "kuiranta", do, korekte: "kuiranta". Se ni formus la frazon jene: "Reveninte hejmen, li trovis sian fratinon kuirante en la kuirejo" - la senco de la frazo estas alia; - en Esperanto la adverba participo ĉiam rilatas la subjekton de la ĉefa propozicio. La subjekto en tiu frazo estas "li" kaj tial la participo rilatas ĝin. - "Reveninte hejmen, li kuirante en la kuirejo trovis sian fratinon", kio montras, ke la senco de la frazo estas tute alia. Jen alia ekzemplo: "Post longa atendado li vokis la junuan knabinon sidanta en la apuda ĉambro". Antaŭ tie-ĉi temas pri la samo. "Voki" estas transitiva verbo, tial la literon "n" ricevas ankaŭ la vorto "sidanta". Do, korekte: "sidanta". Sed se oni formas la frazon jene: "Post longa atendado li vokis la junan knabinon sidante en la apuda ĉambro", nu, en tiu kazo la signifo de la frazo estas alia. La subjekto en la frazo estas "li" kaj la adverba participo rilatas la subjekton de la propozicio. Tial: "Post longa atendado li sidante en la apuda ĉambro vokis la junan knabinon. Sufiĉus diri "knabino", ĉar la knabinoj kutime estas junaj - Malkorekte estas: "Aĉetu por mi domon unuetaĝan ĉu duetaĝan "anstataŭ" aŭ duetaĝan". - Bone estas: "Salutu jen ŝin jen ŝian fratinon". "Li aĉetis por sia familio "domaŭtomobilon" por fari vojaĝon cirkaŭ la mondon". Prefere: ". . . por fari per sia loĝa trenveturilo" vojaĝon . . ." "Tie mi vidis la plej bonan pafiston". - Ni prefere diru: ". . . "La pafistulon de nia lando". "Ĉesu vian kutimon fari ŝuldojn" - "Ĉesi" estas en tiu ĉi frazo netransitiva verbo, kaj tial ni de-

vas unue transitivigi ĝin kaj diri tiel: "Ĉesigu vian kutimon daŭre fari ŝuldojn" aŭ "Ĉesu daŭre fari ŝuldojn". "Nia grupo aĉetas ĉiun novaperintan Esperanto-libron por ĝia biblioteko". Ĉar la grupo aĉetas ĉiun novan Esperanto-libron por sia propra biblioteko kaj ne por la biblioteko de iu alia grupo, la vorto "ĝia" estas malĝusta. Oni diru: "por sia biblioteko". "Tiu ĉi materialo ne akceptas akvon". La frazo ne estas klara. Prefere: "Tiu ĉi materialo estas akvofortena" aŭ "akvoforpuŝa" aŭ "malsorba". Bone estas diri: "sorba papero". "Akva necesejo" estas neklara tial ni prefere diru "fluakva necesejo". Anstataŭ akvofala elektrejo", ni prefere diru: "hidraŭlika elektrejo".

x - x - x - x - x - x

DEZIRAS KORESPONDI

Panczakiewicz WALDEMAR

Adreso: - ul. C. Skłodowickiej 50/52
- 85/88 BYDGOSZCZ - Polònia.

x - x - x - x - x - x

VIZITO - La redakcion vizitis S-ano Frantisek Ptáček, el Prago. Li estas unu el la komandantoj de la ĉeĥa ŝipo "Trinec", kiu dum kelkaj tagoj restadis en nia haveno Santos. Poste li vizitis la ĉefurbon Brazilja'n, kie la cicerono estis la konata S-ano Nelson Pereira de Souza, nia ĝenerala sekretario. S-ano Ptáček vizitis la tombon de Juscelino Kubitschek de Oliveira, ĉekdevena.

x - x - x - x - x - x

KOTIZTABELO DE UEA POR 1980

MA - Membro Abonanto (ricevas Jarlibron kaj la revuon "Esperanto" . 500,00
DM - Dumviva Membro, por la tuta vivo (pagas 25XMA) 12.500,00
MJ - Membro kun jarlibro 200,00
K-to Abono de "Kontakto" 150,00
SA - Simpla abono de la revuo "Esperanto sen membreco de UEA-TEJO 100,00
UN kaj NI - 10 numeroj 125,00
AM - Asociaj Membroj fariĝos ano de la Klubo Lidia Zamenhof 100,00
EO - DOK/Esperanto Dokumentoj - 10 numeroj 250,00

Oni povas sendi la jarkotizon al ĉef-delegito Giuseppe Grattapaglia laŭ la adreso: Caixa Postal n^o 04 - 0097 — CEP. 70.000 - Brasília (DF) aŭ al Kultura Kooperativo de Esperantistoj — Caixa Postal N^o 1887 — CEP. 20.000 — Rio de Janeiro (RJ).

x - x - x - x - x - x

GRAVA SCIIGO

Bedaŭrinde la inflacio ankoraŭ ne flankenlasis nian landon. La Poŝtarifoto altiĝis kaj la eldonado de nia Bulteno estas pli kaj pli kosta. Kvankam iom malgrabila por ni, tamen ni estas devigataj tion informi al nia legantaro, kaj peti helpon eĉ per poŝtmarkoj.

Nia Bulteno estas la sola informilo en nia lando, kiu regule aperadas senpage dank'al niaj malavaraj gesamideanoj, kiuj tion rekonas. Se neniu povas helpi, la geedzoj Almada devas ĝin eldonigi kaj pagi, ĉar nia movado bezonas fortiĝi kaj kreski! Ĉu vi ankaŭ tiel opinias, karaj gesamideanoj? Ni ĉion antaŭdankas, ankaŭ la bonkoran monhelpon.

x - x - x - x - x - x

HEROLDO DE ESPERANTO

Ni sciigas niajn gesamideanojn, ke la gazeton "Heroldo de Esperanto", unu el la plej interesaj periodaĵoj internaciaj, oni povas abonati pere de nia vicprezidanto Amarílio Carvalho, bone konata kaj de ĉiuj ŝatata profesoro. La kotizo por Brazilo estas: U\$ 8,00 (ok dolaroj); aerovoje plus U\$ 3,00 (tri dolaroj). La adreso de la peranto: Praça da República, 54 - 2^o CEP. 20.211 - Rio de Janeiro (RJ).

x - x - x - x - x - x

TRA BRAZILIO . . .

CAÇAPAVA (SP) — Nia vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho bone komprenis la intencon de BKE kaj agadas korekte, ne nur en la ŝtato San-Paŭlo, sed en la tuta lando kaj eĉ eksterlande.

Li posedas specialan talenton por elkovri membrojn neaktivajn de nia movado, grupojn dormantajn kaj tuj aktivigas ilin.

Li kunlaboras kun gazetoj de Caçapava kaj ĝia regiono. Nin li informas, ke D-ro Arnaldo Viana instruas Esperanton al granda grupo de interesatoj en la "Federação Espírita de São Paulo"; ke en João Pessoa (PB) la prof-ro Diniz klopodas enkonduki la internacian lingvon en fakultaton; ke nia vicprezidanto Amaro Pinangé Soares kaj prof-ino Maria José Pontes instruas Esperanton en Recife (PE) al pli ol 100 gelernantoj. Ni dankas pro la sciigoj al nia senlaca batalanto Silva Velho.

x - x - x - x - x - x

BARRA MANSA (RJ) — Nia juna s-ano Pedro Albeirici da Rocha, diligente agadas en tiu urbo, en la societo BAMEK Barra Mansa Esperanto Klubo, kiu estis fondita de la geedzoj Wilson kaj Denise Deslandes. Li kunlaboras kun lokaj gazetoj "A Voz da Cidade" kaj "O Líder", kaj ankaŭ en Volta Redonda en diversaj periodaĵoj.

Ni ne timas, ke nia movado malfortiĝos, ĉar ni havas plurajn diligentajn batalantoj, kiel S-ano Albeirici. Ni gratulas.

x - x - x - x - x - x

LAJEADO (RS) — S-ano Lenio Marobin el tiu urbo sendis al ni tre interesajn sciigojn: Li estas ankoraŭ juna, preskaŭ knabo, sed batalema kaj klopodema membro de nia movado. Li estas kunlaboranto de lokaj gazetoj, kiuj aperigas artikolojn de li verkitajn.

S-ano Marobin tamen ne estas kontenta, ĉar en tiu urbo ekzistas nur tri esperantistoj, sed nur li scipovas la lingvon internacian. Li plendas pro tio, sed li diras: "Tial, mi streĉas ĉiujn miajn fortojn favore al Esperanto, ĉar mi ne deziras, ke Esperanto pereu ĉe la loka popolo".

Jes, li pravus. Tiel oni devas agi en ĉiu orbo kaj regiono. Certe tiel aliaj personoj ekinteresiĝas pri la internacia lingvo. Ni gratulas nian junan batalanton kaj deziras al li sukceson. Memoru ni la vortojn de Zamenhof: "Kuraĝe, antaŭen, la nepoj vin benos se vi pacience eltenos".

x - x - x - x - x - x

RIO DE JANEIRO (RJ) — Kultura

Kooperativo de Esperantistoj informas nin, ke ĝi kolektas ankaŭ la kotizojn por la II-a Latinamerika Kongreso okazanta en S. Luís - Argentino.

La kotizoj ĝis la 31-a de decembro 1979 kostas U\$ 30,00; post tiu ĉi dato ĝi kostas U\$ 40,00 ĝis la 31-V-80; fine, poste U\$ 50,00. Ĝi organizas karavanon por la veturado kaj la interesatoj devas sin turni al ĝi, laŭ la adreso: Cx. Postal N° 1887 CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). La prezidanto de KKE, D-ro Braz Cosenza disponigos la bezonatan planon por la vojaĝo.

x - x - x - x - x - x

SOROCABA (SP)

III - A RENKONTIĜO DE BEJO, DE LA 23-A ĜIS LA 27-A DE JANUARO 1980.

La prezidanto de la Organiza Komitato de la III-A Brazilia Esperantista Junulara Organizo okazanta en Sorocaba (SP), informas nin, ke la kotizoj por tiu evento estas: ĝis la 31-X-1979 - Cr\$ 200,00; kaj post tiu ĉi dato, Cr\$ 300,00. - Oni sendu la monon, ĉu per ĉeko, ĉu per poŝtmandato pagebla en Sorocaba (SP) - CEP. 18.100 Caixa Postal N° 234 - al Pedro Roman Sanches.

x - x - x - x - x - x

PORTO ALEGRE (RS) - D-ro Belmonte de Abreu sendis al ni eltrojaĵon de iu letero, kiun li ricevis el Rumanujo, de d-ro I. F. Bociort, prof-ro de Universitato en tiu lando, kiu diras: "Distribuinte tra la mondo la Preĝon de la Prezidento de Brazilo, Generalo Johano Baptisto Figueido, tradukitan esperanten, la Delegito de UEA en Porto Alegre (RS), D-ro Modesto Belmonte de Abreu, ricevis favorajn kritikojn de brazilaj esperantistoj kaj de pluraj landoj, inter kiuj, tiun de la Prof-ro D-ro I. F. Bociort, de la Universitato de Rumanio, kiu resume diras: "la Preĝo okazigis al mi bonan impreson kaj certe ĝi havos grandan eŭron ĉe niaj kunlaborantoj kaj universitatanoj. Se estos eble, mi petas vin, transdonu al via Prezidento, mian saluton kaj admiron kun bondeziroj de la tuta kolekto Esperanto-Interlingvistika de la Akademio pri Politikaĵ kaj Socialaj Sciencoj de Rumanio; flanke de ĉiuj esperantistoj kaj miaflanke.

Mi gratulas vin pro la brila traduko de la teksto en Esperanton. Vivu nia Paca interrilato! (Rumanio x Brazilo)".

x - x - x - x - x - x

SANTOS (SP) - Estas mirinda la sin dediĉo de kelkaj sinceraj kaj batalmaj idealistoj sen kies helpo ni ne povas sukcesi fortigi nian movadon.

En Santos nia s-ano Claudio Zimmermann vidante, ke ni senlace laboras por nia kara lingvo internacia, por ĝin disvastigi, helpas nin malavare ĉiumonate por la eldonado de nia Informa Bulteno.

Aliaj gesamideanoj bonkoraj same multe helpas nin kaj ni al ĉiuj tutkore dankas la kunlaboradon.

ESPERANTO ELEMENTAR

S-ano Otto Vaske el Caí (RS) laboras senhalte por helpi nian BKE. Li faris propagandon pri Esperanto kaj sugestis, ke ĉiuj interesatoj aĉetu la lernolibron "Esperanto Elementar", ĉar tiel eblas bonege allogi la neesperantistaron pri la lernado de la internacia lingvo.

La libro estis eldonita por la subtenado de la Informa Bulteno de BKE, kiu estas disdonata senpage al ĉirkaŭ 800 personoj.

Alproksimiĝas la jarfino kaj estas kutimo donaci memorarojn al geparencoj kaj geamikoj. Nu, la plej bona donaco estas libro. Ni proponas al ĉiuj helpi la eldonadon de nia bulteno disdonante la libron "Esperanto Elementar", kiu tamen ne estas multkosta, kaj samtempe promocias la movadon en Brazilo.

Karaj gesamideanoj volu aĉeti la libron kaj tiamaniere helpi nin. Anticipe ni dankas.

- x - x - x - x - x -

INTERNACIA VIRINA ORGANIZAĴO

En la jaro 1975-a, dum la 60-a Universala Kongreso, en Kopenhago, estis fondita la Internacia Virina Organizaĵo, kies nuna prezidantino estas fraŭlino Anna Brennan.

En oktobro de ĉi tiu jaro aperis la

unua numero de la "Novaĵletero", kies temo estas "Sekso kaj Egaleco". Ĝi traktas la agadon de la virinoj internaciskale. La organizaĵo celas pridiskuti la rolon de la virinoj en nia movado kaj en la moderna mondo.

Jam multaj virinoj partoprenas la organizaĵon kaj la direktorino ĝojus se la brazilaninoj ankaŭ partoprenus ĝin. Interesatoj volu sin turni al fraŭlino Anna Brennan p/a Nieuwe Binnenweg 197-3, 3021 G.A. Rotterdam - Nederlando. La aliĝkotizo: 2 internaciaj respondkuponoj.

- x - x - x - x - x -

MACEIÓ (AL)

Prof-ro Alves Mata sendis al ni gazeteltranĉaĵon el "Jornal de Alagoas", kiu aperigas tre interesan artikolon pri Esperanto-Movado en Maceió, verkitan de s-ano Medeiros Neto, nuna prezidanto de la tiea Esperanto-Asocio.

En la artikolo estas menciite, ke la

Esperanto-movado ekzistas en Maceió ek de la jaro 1910-a, kaj siatempe estis vigla, ĉar tie vivis s-ano Paulino Santiago, kiu fondis la organizaĵon. S-ano Santiago lernis Esperanton en la jaro 1905-a, kaj ĝis lia morto li vigle agadis en tiu ŝtato de Brazilo. Li estis nomumita prof-ro pri Esperanto de la Akademio pri Komercaj Sciencoj de Alagoas.

Nia vicprezidanto Alves Mata kun granda pacienco kaj klopodo restarigis la grupon kaj denove ekfloras Esperanto en tiu progresema ŝtato.

La direktoraro de BKE ĝojas pro la progressa laboro de la kunlaborantoj.

- x - x - x - x - x -

ORATORA KONKURSO

En la 1-a Kongreso de BKE, kiu okazos de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo, 1980, en Juiz de Fora (MG), la Loka Komitato celas plibonigi la lingvoscion de la esperantistaro, kaj precipe kuraĝigi pri parolado,

ALIĜILO

Pere de Banka Ĉeko aŭ Poŝtmandato oni sendu la monon al kasistino MARIJA POZDER ALMADA — Rua Galeão Carvalhal, 31, apto. n^o 73 — Santos (SP).

KOTIZOJ

Ĝis la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 300,00
Akompanantoj (edzino)	Cr\$ 200,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 50,00

Post la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 400,00
Akompananto (edzino)	Cr\$ 300,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 100,00

Aliĝanto:

Adreso:

Urbo: CPF: Ŝtato:

Akompananto:

Rimarko: Utiligu ĉi tiun parton de la Bulteno, ĝin sendante kune kun la ĉeko, poŝtmandato aŭ alimaniere. La kvitancon de la sendita mono ni faros per bulteno, surlistigante la nomojn de la enskribintoj.

pro tio estis decidite okazigi oratoran konkurson por junuloj de ambaŭ seksoj.

Dum 5 ĝis 10 minutoj la kandidatoj devas paroli en Esperanto pri iu ajn temo rilata al la lingvo, movado, lingvo-baroj, propagandsistemoj, ktp.

Estos aljuĝitaj premioj: la 1-a Cr\$ 500,00; la 2-a Cr\$ 300,00 kaj 3-a Cr\$ 100,00.

- x - x - x - x - x -

PRI GLORO DE L'NUNTEMPA ESPERANTISTA PIONIRO

(Okaze de la 63-a UK en Varna-Bulgario, 1978)

Boris Petrov Cavalĝien

Vi, adepto de l'movado
el elita avangardo
pri l' ideo tiel nobla
kun cel' klara kaj duobla!
Via kontribu' valora
por amata lingvo nia
dum etapo nuna ĝia
venos al triunfo glora!

En vi vivas nia lingvo
en la buŝo kaj la koro,
vi batalas pri l'atingo
de la finsukceso fora!
Sed merito pionira
estos la rekon' admira
kiam nunaj lingvaj baroj

restos nur en la memoro!
Granda estas la honoro
de l' nuntempa pioniro,
al li, pro l' agad' batala
rekompenson la moralan!

Rimarko. - Tiu poemo estis sendita al ni de nia sam-ino Nydia Krieger. - Dankon!

- x - x - x - x - x -

BRAZILA AKADEMIO DE KLERULOJ

Nia kara vicprezidanto D-ro M. Belmonte de Abreu, sendis al ni tre interesan sugeston. Li plendas pro la ne ekzisto de Brazila Belletra Akademio en nia ĉefurbo Brazilja, kaj pro tio sugestas krei organizaĵon komponitan el la plej elstaraj kleruloj de Brazilo sub la titolo "BRAZILA AKADEMIO DE KLERULOJ", aŭ "BRAZILA CENAKULO" (Cenaculus Brasiliensis). Devas partopreni tiun elstaran organizon individuoj, kiuj estos ĉiam efikaj, dinamikaj kaj aktualigitaj, kaj post kiam ili ricevos la titolmembrigon fare de la Klerula Akademio, ilia devo estos produkti laborojn, malkatenitajn de ĉia ajn diskriminacia antaŭjuĝo rilate la plej aktualajn antaŭenirojn de la civilizacio.

Tiel estas lanĉita la ideo, kiun ni trovas tre laŭdinda.